

MULTAJ PLANOJ FINE DE APRILO

En la lastaj semajnoj de aprilo okazos pluraj eventoj organizitaj de Liceo (krom la preparoj por la tuj okazonta Hispana Kongreso en Sorio.

La unua estos la tradicia partopreno en la legado de Don Quijote en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes. Post nia anonco en pasinta bulteno, ni jam trovis du junajn volontulojn por tiu legado, sed ĉiu ajn povas akompani ilin en la evento, kaj malkovri kiel oni tion organizos.

Nia vico alvenos je la komenco de la aktivado, la 23-an je la 20,00 horo, kaj ni rendezuos duonhoron antaŭe, por ĉion pretigi. Vi povas sekvi ĝin, kaj trovi aliajn aktivadojn, en: <https://www.circulobellasartes.com/humanidades/xxix-lectura-continuada-del-quijote/>.



NOKTO DE LA LIBROJ: MARUJA MALLO

Madrida Esperanto-liceo denove partoprenos en “La Nokto de la libroj”, organizita de la madrida regiono, en kiu en unu vespero/nokto, amaso de librovendejoj, bibliotekoj, kulturaj institucioj, asocioj..., festas la librojn.



Ni proponas al vi la prezentadon, fare de ĝia aŭtoro, Ana Manero, de verko pri la pentristino Maruja Mallo, apartenanta al elstara periodo de la hispana kulturo en la 20a kaj 30a jardekoj de la 20a jarcento. La libro, kun titolo: “Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia”, kaj eldonata de SATEh (SAT en Hispanio), estas dulingva, hispana kaj esperanta.

Nia evento okazos vendrede la 25an de aprilo je la 18,00 vespere ĉe la sidejo de HEF/MEL.

Ne maltrafu, precipe se vi ŝatas pentrarton.


Pliaj informoj aperos en <https://eventaservo.org/e/24aa46>, kaj la tuta programo de la Nokto estos baldaŭ konsultebla en: <https://web.comunidad.madrid/lanochedeloslibros/>.

PREZENTO DE ROMANO DE STASIA CHYLICKI

Tre baldaŭ post la antaŭaj anoncoj, la 28-an de aprilo, je la 18:45, okazos alia prezentado: la itala esperantisto kaj arabisto, Viviana, prezentos al ni sian romanon eldonitan dulingve (itale kaj esperante), sub pseŭdonimo Stasia Chylicki.

La romano rilatas sperton, ne foran de la vivo de la aŭtoro, pri familia malkovro kaj renkonto, en kiu la internacia lingvo iele rolis.

Pliajn informojn kaj aktualigojn vi trovos en: <https://eventaservo.org/e/caee2b>.



ARTIKOLO EN “EL CONFIDENCIAL”

Pluraj madridanoj estis intervjuitaj por raporto kiu aperis en la reta gazeto “El Confidencial”. La titolo de la artikolo estas «“En casa hablamos esperanto desde que mis hijas tenían dos años”: la lengua que traspasa generaciones». Ĝi pritraktas diversajn aspektojn de la internacia lingvo kaj ĝia stato.

Vi povas ĝin legi en https://www.elconfidencial.com/alma-corazon-vida/educacion/2025-03-25/ensenanza-esperanto-espana-idiomas_4088054/.

NOVAĴOJ DE LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

La organiza komitato de la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso 2025, kiu okazos en Sorio komence de majo, publikigis la unuan version de la programo.

Ni ĝuos muzikon, poezion, filmfestivalon, ekskursojn, kvizojn, magion, prelegojn, laborsesiojn, amikajn renkontojn kaj multe pli. Vi povas trovi ĝin en: <https://kongreso.esperanto.es/la-programo/>.

Fine de marto fermiĝis la rabatita aliĝperiodo. Ĝis nun jam pli ol 140 homoj aliĝis.

Ni memorigas ke pliajn informojn oni povas trovi en la adreso: <https://kongreso.esperanto.es/>, kun la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj, kaj ke oni malfermis Telegramkanalon: <https://t.me/HispanaEsperantoKongreso>, kiu taŭgas por ricevi ĝisdatiĝojn de la organizado, kaj por ke kongresanoj povu interkomunikiĝi.

MADRIDAJ RENKONTOJ

Memoru ankaŭ ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

La unuasabata kunveno okazos la 5-an de aprilo, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera kaj sen programo.


PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. En la socia retejo Tŭitero vi povas trovi nin ĉe: <https://x.com/LiceoMadrida>. Kaj memoru ke MEL malfermis profilon ankaŭ en la socia reto *Bluesky*, en la adreso: <https://madridaliceo.bsky.social>.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo <https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g>

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.



madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

